L 5669 F

grkg

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft

verlag modernes lernen
P.O.B. 100 555
D - 4600 Dortmund 1

Die Humankybernetik (Anthropokybernetik) umfaßt alle jene Wissenschaftszweige, welche nach dem Vorbild der neuzeitlichen Naturwissenschaftversuchen, Gegenstände, die bisher ausschließlich mit geisteswissenschaftlichen Methoden bearbeitet wurden, auf Modelle abzubilden und mathematisch zu analysieren. Zu den Zweigen der Humankybernetik gehören vor allem die Informationspsychologie (einschließlich der Kognitionsforschung, der Theorie über „künstliche Intelligenz" und der modellierenden Psychopathometrie und Geriatrie), die Informationsästhetik und die kybernetische Pädagogik, aber auch die Sprachkybernetik (einschließlich der Textstatistik, der mathematischen Linguistik und der konstruktiven Interlinguistik) sowie die Wirtschafts-, Sozial- und Rechtskybernetik. - Neben diesem ihrem hauptsächtlichen Themenbereich pflegen die GrKG/Humankybernetik durch gelegentliche Übersichtsbeiträge und interdisziplinär interessierende Originalarbeiten auch die drei anderen Bereiche der kybernetischen Wissenschaft: die Biokybernetik, die Ingenieurkybernetik und die Allgemeine Kybernetik (Strukturtheorie informationeller Gegenstände). Nicht zuletzt wird auch metakybernetischen Themen Raum gegeben: nicht nur der Philosophie und Geschichte der Kybernetik, sondern auch der auf kybernetische Inhalte bezogenen Pädagogik und Literaturwissenschaft. -

La prihoma kibernetiko (antropokibernetiko) inkluzivas ĉiujn tiajn sciencobranĉojn, kiuj imitante la novepokan natursciencon, klopodas bildigi per modeloj kaj analizi matematike objektojn ĝis nun pritraktitajn ekskluzive per kultursciencaj metodoj. Apartenas al la branĉaro de la antropokibernetiko ĉefe la kibernetika psikologio (inkluzive la ekkon-esploron, la teoriojn pri „artefarita intelekto" kaj la modeligajn psikopatometrion kaj geriatrion), la kibernetika estetiko kaj la kibernetika pedagogio, sed ankaŭ la lingvokibernetiko (inkluzive la tekststatistikon, la matematikan lingvistikon kaj la konstruan interlingvistikon) same kiel la kibernetika ekonomio, la socikibernetiko kaj la jurkibernetiko. - Krom tiu ĉi sia ĉefa temaro per superrigardaj artikoloj kaj interfake interesigaj originalaj laboraôj GrKG/HUMANKYBERNETIK flegas okaze ankaŭ la tri aliajn kampojn de la kibernetika scienco: la biokibernetikon, la inĝenierkibernetikon kaj la ĝeneralan kibernetikon (strukturteorion de informecaj objektoj). Ne lastavice trovas lokon ankaŭ metakibernetikaj temoj: ne nur la filozofio kaj historio de la kibernetiko, sed ankaŭ la pedagogio kaj literaturscienco de kibernetikaj sciaĵoj. -

Cybernetics of Social Systems comprises all those branches of science which apply mathematical models and methods of analysis to matters which had previously been the exclusive domain of the humanities. Above all this includes *information psychology* (including theories of cognition and 'artificial intelligence' as well as psychopathometrics and geriatrics), *aesthetics of information* and *cybernetic educational theory*, *cybernetic linguistics* (including text-statistics, mathematical linguistics and constructive interlinguistics) as well as *economic*, *social* and *juridical cybernetics*. - In addition to its principal areas of interest, the GrKG/HUMANKYBERNETIK offers a forum for the publication of articles of a general nature in three other fields: *biocybernetics*, *cybernetic engineering* and *general cybernetics* (theory of informational structure). There is also room for *metacybernetic* subjects: not just the history and philosophy of cybernetics but also cybernetic approaches to education and literature are welcome.

La cybernétique sociale contient tous le branches scientifiques, qui cherchent à imiter les sciences naturelles modernes en projetant sur des modèles et en analysant de manière mathématique des objets, qui étaient traités auparavant exclusivement par des méthodes des sciences culturelles („idéographiques"). Parmi les branches de la cybernétique sociale il y a en premier lieu la psychologie informationelle (inclues la recherche de la cognition, les théories de l'intélligence artificielle et la psychopathométrie et gériatrie modeliste), l'esthétique informationelle et la pédagogie cybernétique, mais aussi la cybernétique linguistique (inclues la statistique de textes, la linguistique mathématique et l'interlinguistique constructive) ainsi que la cybernétique en économie, sociologie et jurisprudence. En plus de ces principaux centres d'intérêt la revue GrKG/HUMANKYBERNETIK s'occupe - par quelques articles de synthèse et des travaux originaux d'intérêt interdisciplinaire - également des trois autres champs de la science cybernétique: la biocybernétique, la cybernétique de l'ingenieur et la cybernétique générale (théorie des structures des objets informationels). Une place est également accordée aux sujets métacybernétiques mineurs: la philosophie et l'histoire de la cybernétique mais aussi la pédagogie dans la mesure où elle concernent la cybernétique.

ISSN 0723-4899

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft L 5669 F

Internationale Zeitschrift für Modellierung und Mathematisierung in den Humanwissenschaften
Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj
International Review for Modelling and Application of Mathematics in Humanities
Revue internationale pour l'application des modèles et de la mathématique en sciences humaines

grkg
HUMANKYBERNETIK

Inhalt * Enhavo * Contents * Sommaire

Band 31 * Heft 2 * Juni 1990



verlag modernes lernen - Dortmund

Die GRUNDLAGENSTUDIEN AUS KYBERNETIK UND GEISTESWISSENSCHAFT (GrKG/Humankybernetik) wurden 1960 durch Max BENSE, Gerhard EICHHORN und Helmar FRANK begründet. Sie sind z.Zt. offizielles Organ folgender wissenschaftlicher Einrichtungen:

Institut für Kybernetik Berlin e.V. (Direktor: Prof. Dr. Uwe LEHNERT, Freie Universität Berlin)

TAKIS - Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (prezidanto: Prof. Inĝ. Aureliano CASALI, Instituto pri Kibernetiko San Marino; Ĝenerala Sekretario: d-ro Dan MAXWELL, BSO Utrecht)

La AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ San Marino publikigadas siajn oficialajn sciigojn komplete en GrKG/Humankybernetik.

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft



Internationale Zeitschrift für Modellierung und Mathematisierung in den Humanwissenschaften
Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj
International Review for Modelling and Application of Mathematics in Humanities
Revue internationale pour l'application des modèles et de la mathématique en sciences humaines

Inhalt * Enhavo * Contents * Sommaire **Band 31 * Heft 2 * Juni 1990**

 verlag modernes lernen - Dortmund

Verlag und Anzeigenverwaltung | ***Eldonejo kaj anoncadministrejo*** | **Publisher and advertisement administrator** | ***Edition et administration des annonces***

verlag modernes lernen - Dortmund Borgmann KG

Ein Unternehmen der InterService BORGMANN® - Gruppe

P.O.B. 100 555 · Hohe Straße 39 · 4600 Dortmund 1 · Tel. 0049 0 231 / 12 80 08
Telex: 17 231 329 interS · Teletex 231 329 · FAX 02 31 / 12 56 40

Die Zeitschrift erscheint vierteljährlich (März, Juni, September, Dezember) Redaktionsschluß: 1.des Vormonats. - Die Bezugsdauer verlängert sich jeweils um ein Jahr, wenn bis zum 1.Dezember keine Abbestellung vorliegt. - Die Zusendung von Manuskripten (gemäß den Richtlinien auf der dritten Umschlagseite) wird an die Schriftleitung erbeten, Bestellungen und Anzeigenaufträge an den Verlag. - Z.Zt. gültige Anzeigenpreisliste: Nr. 4 vom 1.1.1985.
La revuo aperadas kvaronjare (marte, junie, septembre, decembre). Redakcia limdato: la 1-a de la antaŭa monato. - La abondaŭro plilongiĝadas je unu jaro se ne alvenas malmendo ĝis la 1-a de decembro. - Bv. sendi manuskriptojn (laŭ la direktivoj sur la tria kovrilpaĝo) al la redaktejo, mendojn kaj anoncojn al la eldonejo. - Validas momente la anoncprezlisto 4 de 1985-01-01.
This journal appears quarterly (every March, June, September and December). Editorial deadline is the 1st of the previous month. - The subscription is extended automatically for another year unless cancelled by the 1st of December. - Please send your manuscripts (fulfilling the conditions set out on the third cover page) to the editorial board, subsription orders and advertisements to the publisher. - Current prices for advertisements: List no. 4 dated 1-1-85.
La revu apparait trimestriel (en mars, juin, septembre, decembre). Date limite pour la redaction: le 1e du mois precedent. - L'abonnement se continuera chaque fois par une annee, a condition que n'arrive pas le 1e de decembre au plus tard une revocation. - Veuillez envoyer, s.v.pl., des Manuscripts (suivant les indications sur la troisieme page de la couverture) a l'adresse de la redaction, des abonnements et des commandes d'anonces a celle de l'edition. - Au moment est en vigueur le tarif des anonces no. 4 du 1985-01-01.

Bezugspreis: Einzelheft 18,-DM, Jahresabonnement 72,-DM inkl. MWSt. und Versandkosten, Ausland 76,-DM

Druck: Reike Offset- und Siebdruck GmbH, D-4790 Paderborn-Wewer

grkg / Humankybernetik
Band 31 · Heft 2 (1990)
verlag modernes lernen

Kelkaj tezoj por la evoluo de lernantorientiĝaj instru- kaj lernstrategioj por kognitivaj instruaĵoj

de Dr. Vlastimil POLÁK

La fokuso de la ĉi-prezentota laboraĵo konsistas el la evaluado kaj pretigado de instru- kaj lernstrategioj por subteni la lernadon de nocioj kaj la solvadon de problemoj. Mi komencos kun la diskuto de la valoro de lern- kaj instrustrategioj por la pedagogio. Poste mi klarigos la tezojn kiuj gravas por la evoluo de lernantorientiĝaj instru- kaj lernstrategioj. Fine mi prezentos tian instru-/lernstrategion por la lernado de nocioj en la kunteksto de la jam konataj nocioj.

La valoro de instru-/lernstrategio

Sub strategio oni komprenas planitan (laŭsisteman) agmanieron kiu ebligu nin pli facile, pli rapide kaj pli certe atingi celon ol sen ĝi. Memkompreneble ekzistas en la plej multo da problemaj situacioj ne nur unu sed pluraj strategioj kondukantaj al la vidata celo. La eblaj strategioj diferenciĝas laŭ la grado de sia efiko. La efiko de strategio difiniĝas pere de la facileco de sia realigado, la rapideco kaj la precizeco rilate la atingon de la celo. En la literaturo ĉi-koncerna (komparu ekz. Miller/Galanter/Pribram (1973)) oni ankaŭ diferencigas inter „taktikoj" kaj „strategioj". En tiu kazo la nocio de la taktiko celas plej ofte al elementaj kognitivaj operacioj kiel komparo, ĝeneraligado, klasifikado, ordigado ktp. kaj la strategio celas al la kapablo ordigi tiajn operaciojn laŭ organizita sekvenco.

Lernstrategio nomiĝas en ĉi-kazo strategio por atingi intencitan lerncelon, krome instrustrategio nomiĝas strategio por atingi intencitan instrucelon. Tian lernstrategion la lernanto mem povas krei (el la aro de al li konataj lernstrategioj) kaj apliki aŭ ricevi ĝin de la instruanton. La instruanto (aŭ instruilo) aplikas instrustrategion por atingi celon kiun li mem determinis. Dum tio povas okazi ke ankaŭ la lernstrategio fariĝas parto de la komencita instrustrategio kaj renverse.

Pri la parto de la instru-/lernmetodoj (resp. instru-/lernstrategioj) por lernsukceso oni ekscias diferencajn, ofte unu la alian malebligantajn atestojn. La pruvilojn por tio, ke la instruesploro venas en „bela reguleco" al kontraŭdirataj respektive irelevantaj rezultoj, oni trovas i.a. en la laboraĵo de N.E. Wallen/R.M. Travers (1970). Tiaj „pesimismaj starpunktoj" kontraŭsj „optimismajn opiniojn".

Sur la ebeno de la instrumetodoj kaj de la instruteno oni povas laŭ opinio de optimismaj instruadsciencistoj jam ne plu globale kompari inter la metodoj, sed oni devas identigi la decidajn elementojn interne de metodo.

Dum longaj jaroj la observeblaj sintenoj de instruistoj kaj lernantoj staris en la centro de la instruostudo kaj la sistemoj de la sinteno- kaj instruobservo estis evolu-

ata, forŝoviĝas la intereso de la multaj studuloj kaj praktikuloj sur la kognitivajn, do ne rekte observatajn procesojn. Tio okazas en la akcepto, la homa sinteno estas pli bone klarigata per teorioj, kiuj rigardas instruistojn kaj lernantojn kiel informprilaboron aŭ problemsolvon kaj malpli kiel reagantojn pro stimuloj.

Por motivi kaj konstrui instru- kaj lernstrategiojn same kiel instruo- kaj lernmetodojn estos aplikataj krom de la informteoria ankaŭ pliaj legitimoj kiel „logika", „psikologia", „kibernetika", „biologia" kaj „sistemteoria" (precipe tiuj kiuj devenas de la artefarita inteligenteco) esploro.

En la donita laboraĵo estas starigita la tezo, ke la efikeco de iu instru- kaj lernstrategio per iu taŭga kombinaĵo tiaj alireroj povas esti plialtigita.

Precipan frapecon kaŭzis inter la instrumetodaj diraĵoj kaj agrekomendoj la lernantoorientigaj metodoj aŭ strategioj. Ili koncentriĝas je la demando pri akiro de kono aŭ kapablo kaŭ vojigo de memstareco aŭ memdetermino.

Lernanto-orientigaj instruo- kaj lernstrategioj

Lernanto-orientiga instruado celas realigi unuflanke tiom da libereco je decido kaj memstareco kiom eblas, aliaflanke prezento de instruaĵo adaptita al la lernanto. Tia instruado klopodu prikonsideri la individuajn antaŭkondiĉojn de lernado por la lernanto kaj samtempe liveru al li rolon de efikaj helpiloj por subteni lian lernproceson.

Sekvas kelkaj tezoj, kiuj laŭ mia opinio gravas por realigi sukcespromesan lernantoorientigajn lern- kaj instrustrategiojn. Tiujn tezojn mi poste uzos por konstrui tian strategion por konkreta instrucelo kaj sekve denove mencios tiun procedon.

Tezo 1: Instru- kaj lernstrategioj devas permesi tiom da libereco je moviĝado kaj decido kiom eble

La pedagogiaj klopodoj aranĝi la instruadon tiom malferma kiom eble gvidis al la nocio de la malkovra lernado kaj instruado (vd. ekz. Bruner (1970)). Tiutipa instruado kaj lernado havas altan pedagogian valoron. Tial la pedagogia esploro devas interesiĝi pri la evoluo de sufiĉe larga repertuaro de metodoj por subteni kaj gvidi la malkovran lernadon. Dum tio komputiloj kaj aliaj medioj povas oferti efikan helpon. La novaj medioj povas altigi la lernsukceson de la lernantoj. Ekzemple ili povas altigi la interaktivan kvocienton inter instruisto kaj lernanto, ili povas enkadrigi individuan labormanieron laŭ propra kognitiva lernstrukturo.

Tezo 2: Instru- kaj lernstrategioj prikonsideru la kognitivan stilon de la lernantoj

Sendube la kognitiva stilo de individuo ludas gravan rolon ĉe la lernado. La esploristoj Pask/Scott (1972) opinias: „A student learns in a way that depends upon his individual cognitive style."

Pri la nocio de kognitiva stilo opinias Cronbach/Snow (1977): „La nocio pri kognitiva stilo enhavas daŭran skemon aŭ preferaton strategion de informprilaborado."

Kiel lernspecifajn stilojn mencias Vester (1975) la verbalan-abstraktan, okulanvidan, aŭdan, tuŝan lerntipojn kaj la paroltipon.

Laŭ Heidt (1977) oni povas nomi stilojn lernitaj-, kultur- kaj tavolspecifaj sistemoj de preferoj. Li rigardas la jenajn kognitivajn stilojn gravaj:

a) Niveliga kaj profiliga tendenco
b) Rigideco kaj fleksebleco
c) Reflektiveco kaj impulseco
ĉ) Dependeco kaj sendependeco de la ĉirkaŭaĵo

En ilia diferencigo inter diversaj lernstiloj Kolb/Goldmann (1973) indikas al la bazan procedon de la enigo kaj prilaborado de informo. En ilia modelo pri lernado per sperto ili agnoskas kvar fazojn. Alie ol aliaj esploristoj Kolb/Goldmann ne rigardas gravaj la karakterizon en la unuopaj dimensioj, sed la kombino de diversaj dimensioj en la unuopa persono (vd. ankaŭ Graumann (1971)). Ili diferencigas inter la tipoj de konverĝanta, diverĝanta asimila kaj akomoda lernanto.

Por ĝia trafeco, forta alludebleco kaj bela realigebleco mi elektis por mia laboro la aliron de Pask/Scott (1972/1976). Pask/Scott rereliefigis la jam konatan fakton, ke lernanto ĉiam klopodas havigi al si la lernendaĵon pere de unu el la metodoj priskribotaj. Aŭ li lernas „paŝon post paŝo" aŭ li klopodas akiri vastan rigardon en la lernendaĵo; tio estas ke li provas kapti la tutan problemaron unufoje globale, ĉar estas por li eble tro streĉe iri pere kaj malrapide de unu scio pri fakto al alia kaj iam poste atingi pli altan scionivelon. Pask/Scott enkondukis la nociojn „holist" (oni diru tuteca lernanto) kaj „serialist" (oni diru paŝ-post-paŝ lernanto) por tiuj kognitivaj stiloj de la lernantoj.

La rezultoj el la prilaborado de Pask/Scott montras ke la sukcesa efika lernado povas ekzemple tiam okazi kiam oni evoluas kaj aplikas holistan kaj serialistan strategiojn por la instruado de lernantoj. Ali flanke oni ne povas ignori ke laŭ la instruprogramo pri „marŝa bestaro" evoluitaj instru- kaj lernstrategioj nur priskribiĝas en „teknika" maniero. Antaŭ ĝi oni supozas iun teorion sed nur aludas ĝin. Tial mi pli evoluis la menciitan aliron de Pask/Scott kaj priskribis hipotezajn modelojn de serialista kaj holista instru- kaj lernstrategio. Pro la priskribita tezo 1 oni devas evolui instru- kaj lernstrategiojn kiuj ebligas dialogon inter instruisto kaj lernanto.

La evoluo kaj apliko de lernstilorientiĝaj instru- kaj lernstategioj laŭ dialoga sistemo antaŭkondiĉas unu flanke la konon de la ecoj de tiaj strategioj kaj ali flanke la rekonon de ebleco, kiu strategio taŭgas por kiu adresato.

Por la priskribo de la celata instru- kaj lernstrategioj oni prikonsideras krome la diferencon inter la makro- kaj mikrostrukturo.

A) Serieca instru- kaj lernstrategio

La makrostrukturo de tiu instrustrategio (lernstrategio) markiĝas per jenaj ecoj:

a) Lernado, rememorado kaj resumado de „korpoj" de informo en esprimoj konsistantaj el „ŝnurecaj" kognitivaj strukturoj. La unuopaj eroj rilatiĝas per simplaj datumaj ĉenoj kaj formale esprimiĝas per pli malaltaj relaciaj leĝoj.
b) Asimilado de kutime pli longaj serioj kaj datumoj.
c) Netoleremo kontraŭ nerelevantaj informoj.
ĉ) Simplaj hipotezoj por la koncerna problemo.
d) Laŭsistema aliro, paŝ-post-paŝ lernado.
e) Perfektigemo (nova tasko nur kiam la malnova estas solvita ĝuste).

En sia modelo Pask/Scott konjektis, ke la kvin sekvantaj agoj de la instruisto/lernanto (aŭ de la instruilo) gravas por la priskribo aŭ realigo de lernstilorientiga instruo- kaj lernstrategio

a) bilda prezento (A)
b) kunteksta informo (I)
c) operacia strukturo (S)
ĉ) fizikaj karakterizaĵoj (C)
d) nomo kaj ties klarigo (B)

Tiuj komponentoj validas kaj por la serialistoj kaj por la holistoj kaj kompletiĝas por la lernantoj per kroma sesa komponento

e) kreo de hipotezo kaj ties testado (N).

La mikrostrukturo de la serieca instru- kaj lernstrategio aspektas tiam laŭ la prilaborado de la instruprogramo „marsa bestaro" kreita de Pask/Scott jene:

(B) ⟶ I ⟶ A ⟶ N ⟶ B ⟶ N (. . .) ⟶ I ⟶ S ⟶ N ⟶ C ⟶ N ⟶ I

Ĉi tie la krampo ĉirkaŭ B signifas ke la ago aperis nur ĉe kelkaj serialistoj kaj la krampo kun punktoj ene simbolas la eblan ripeton de la antaŭa agsekvenco.

B) Holistika instru- kaj lernstrategio

Analoge al Pask kaj Scott mi diferencigas ĉi tie inter la neredundaj kaj la redundaj holistoj. La makrostrukturo de la instrustategio (lernstrategio) por neredundaj holistoj prezentiĝas per jenaj karakterizaĵoj:

a) Klopodo havigi al si rektan kaj kompletan rigardon pri la lernendaĵo (tuj globale havigi al si la tutan problemaron),
b) krei pli kompleksajn hipotezojn
c) la reflektado de neredunda holisto estas bone ligta en lia percepto
ĉ) intereso nur pri la ĉikoncernaj partoj de lernendaĵo.

La mikrostrukturo de la neredunda holistika instru- kaj lernstrategio havas la jenan formon: A ⟶ B ⟶ S ⟶ C (. . .) ⟶ N ⟶I

La makrostrukturo por redundaj holistoj karakteriziĝas per jenaj ecoj:

a) la klopodo akiri rektan kaj vastan rigardon en la lernendaĵo (ili provas kapti la tutan problemaron globale)
b) krei pli kompleksajn hipotezojn
c) reflektado de redunda holisto enhavas logike ne relevantan kaj suprajn materialon
ĉ) kreo de retaroj kun redundaĵoj
d) nerilata agmaniero (saltoj)

La mikrostrukturo de la redunda holistika lernstrategio aspektas jene:

N ⟶ A ⟶ I ⟶ N ⟶ S ⟶ N ⟶ C ⟶ N ⟶ B ⟶ N ⟶ I

Por la diagnozo de la lernanto por la elekto de la instru- kaj lernstrategio adaptita al si oni povas uzi diversajn testojn.

Tezo 3: La instru- kaj lernstrategio subtenu la kapablon de la lernanto solvi problemon

Ĉiu tipo de studado kaj lernado montras ĉiam, ke la lernantoj devas ricevi efikajn lernhelpilojn por ke ili kontentigu la postulojn al si. La statistikoj pri la rompokvotoj de studantoj kaj la rezultoj de la esploroj de pluraj esploristoj donas frapajn pruvojn por tio ke oni unue ebligu al la lernanto superi la donatajn informojn kaj postulatajn taskojn.

Ekzemple Dörner (1976) kiu dum psikologia eksperimento en kiu komputilo simulas kompleksan fiktivan sistemon observis la sintenon dum problemsolvado de prieksperimentatoj. La malsukceso de la granda parto de la prieksperimentatoj estis kaŭzita de la malgranda kapablo je problemsolvado. Laŭ Dörner tion kaŭzis la manko je scio - supera nocio pri nescio kaj nekapablo uzi disponeblan scion - kaj mankoj ĉe la uzataj pensmanieroj.

Necesa evidentiĝis el tiu eksperimento la postulo ke homoj lernu pensi per kaŭzalaj retoj anstataŭ per kaŭzalaj ĉenoj. Nia pensilaro principe adaptiĝis al la prilaborado de tiu „lineara" scio. Tiel ni homoj apenaŭ evoluis la kapablon racie reagi al rapidaj dinamikaj ŝanĝoj, kvankam ni ja vivas en mondo konsistanta el dinamikaj sistemoj (sociaj sistemoj, ekologiaj sistemoj, teknikaj sistemoj). Mankas al ni kibernetika scio kaj la kapablo ĝuste prilabori tiun scion en sistemorientiga pensado.

Aro da esploristoj sukcesis pruvi, ke eĉ la kreiva aspekto de la pensado povas esti apogata per instruado kaj pli. Nome, ke almenaŭ la lernanto ricevu kelkajn teknikojn por pensi kaj solvi problemojn, por ke li superu la taskojn donitajn. Laŭ van Parreren (1977): Se oni instruas prieksperimentatoj heŭristikajn metodojn por iu problemtipo, ili solvas pli da problemoj. Se oni instruas al ili krome ion pri problemanalizo ĝenerale, la ekspekto je solvoj fariĝos pligranda.

Tiuj kapabloj storitaj en la kognitiva strukturo povas esti aplikataj, trajnataj kaj ŝanĝataj ĉe simulado aŭ modeligo, nome per tio ke la efikoj de la propra agado estas rekte observebla kaj modifebla dum la simulado. Tio siavice havas proprajn rektajn efikojn. Dum simulado aŭ modeligo la lernanto povas elprovi kaj modifi sian jam komprenitan scion pri kompleksaj sistemoj kaj la kapabloj trovi la vojon en ili.

La rezultoj de la laboraĵoj priparolitaj ĉi tie indikas ke la leĝoj de la informprilaborado per la homa cerbo ne estas precipe komplikaj procedoj kaj ke eblas redukti la homan informprilaboradon al elementaj procedoj. Tuj rekonebla estas la analogio al la laboraĵoj ĉe la kampo de artefarita inteligenteco: Laŭ Newell/Simon (1972) la elementaj informprocedoj necesaj por informprilabora sistemo konsistas el la jenaj unuopaj procedoj:

legaj, skribaj, estingaj, kreivaj, komparaj kaj transdonaj procedoj.

Konforme al la celo de tiu ĉi laboro, nome la evoluo de lernantoorientigaj instru- kaj lernstrategioj por la subteno de problemsolva sinteno de la lernanto, la respondo de Sydow (1981) pri la demando, ĉu ĉiu problemo posedas propran specifan strukturon aŭ ĉu por tutaj klasoj da problemoj ekzistas komunaj strukturecoj, ŝajnas esti grava: Multaj esploroj pri transferoj kaj rezultoj pri trejnado de problemsolvado. Saugstad (1957) ŝajnas verigi la duan respondon. Ĉicele oni povas rigardi la ordigan bazan ritmon derivita en ĉi laboro el la pripensoj de ŝakludanto. Tia strategio de problemsolvado similas ankaŭ al la modeloj evoluitaj en kadre de la agoteorio, ekzemple la esploristoj Miller/Galanter/Pribram konstatas (1973) konstatas: „Nia agado estas gvidata de planoj kiuj siavice kuŝas en pli vastaj metaplanoj, kiuj kreas la subplanojn adekvatajn al la situacio. La metaplano estas storita, la subplanoj estas la unuoj storitaj de ĝi kaj efikiĝas je la ĝusta tempo.

Por evolui instru- kaj lernstrategiojn adaptitajn al la lernanto oni devas respekti la principon ke tiaj strategioj prikonsideru la leĝaron de homa problemsolvado. Ne

suficas ke la lernanto ricevu sufiĉe da taskoj inkluzive iliaj solvoj. Necesas ke li ankaŭ povu postuli helpojn, kiuj donu al li ĝenerale validaj orientiloj por solvi problemon.


Mi klarigos la jam priskribitajn strategiojn seriecan kaj holistikan pere de la instruaĵo „ekesto de feno". Ne temas pri lernado de nocioj en la senco de „concept learning" sed pri la lernado de nocioj en kunteksto kun la jam konataj nocioj. La nociojn oni povas rigardi ankaŭ kvazaŭ signoj en la senco de la signoteorio. Do ĉiu signo povas plenumi siajn semantikan, pragmatan kaj sintaksan signofunkciojn.

Tri situaciaj momentoj karakterizas la aliron de Pask/Scott. Nome la ordigo de la unuopaj formoj de informoprezento pri la nocioj kaj la prikonsidero de la specifaj proprecoj de la holistoj kaj la serialistoj. Krome prezentiĝos la tezo, ke la lernantoj en ĉiu unuopa kazo kreas dum la lernado hipotezojn pri la prezentitaj nocioj kaj ilia nocia strukturo laŭ la holistika respektive la serieca agmaniero. En ĉi tiu modelo oni diferencigos sur la komunika nivelo de la transdono de scio inter la SIGNIFO kaj la KRUDA SIGNIFO de nocioj.

Sur la ebeno de SIGNIFO oni rigardas la nociojn kiel parton de struktura diagramo. Ĉiu nocio difiniĝas enkadre de sia nocia strukturo pere de aliaj nocioj. Por la nocia strukturo sur la nivelo de la SIGNIFO en struktura diagramo validas ke la apudaj nocioj troviĝas en logika rilato unu al la alia (vd. bildo 1).

Gravas por ĉi tiu modelo de transdono de scio, ke la informo pri ĉiu ĉeestanta nocio sur la nivelo de la KRUDA SIGNIFO povas esti pli malpli redunda. La prezento de la nocioj el la struktura diagramo sur la nivelo de la SIGNIFO kaj de la KRUDA SIGNIFO klariĝas pere de la sekvantaj ekzemploj.

nomo	kruda signifo	ekzakta signifo
aero	nevideblaĵo ĉirkaŭvolvanta la teron. Enspiraĵo. La aero povas moviĝi ktp.	Aero estas la miksaĵo de gasoj el kiu konsistas la atmosfero. La aero konsistas el nitrogeno, oksigeno ktp.
aerpremo	Pli malpli dikigita pilko, pneumo ktp.	La premo de la atmosfero ĉefe pro la pezo de la aero troviĝanta super ĝi. Ĝi mezuriĝas per barometro. La aerpremo ĉe la mara nivelo ampleksas ĉirkaŭ 760 Torr (1013mb) kaj malaltiĝas laŭ la alto ktp.
altprema regiono	Regiono kie estas bela vetero kaj la aerpremmezurilo montras altan nombron.	Regiono kun alta premo ĉe la tero kie la aerpremo malaltiĝas laŭ la malproksimo. Ĝi konsistas precipe el varma aero. En altaj latitudoj okazas ankaŭ malvarma altpremo.



Bildo 1: Strukturdiagramo por la lerncelo „Ekesto de la feno"

Sur la nivelo de la KRUDA SIGNIFO ŝanĝiĝas la rilato inter la semantika sintaksa kaj pragmata signofunkcioj. La semantika funkcio malpeziĝas. Samtempe la sintaksa funkcio povas pligraviĝi. Sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO la pezo de la pragmata funkcio altiĝas.

Per la ŝanĝiĝo de la pezoj de la rilatoj inter la signofunkcioj ekestas „nova" jam menciita nocio - la KRUDA SIGNIFO. La „ĝisnuna" nocio estis reformita per tiu ŝanĝiĝo al „alia" nocio, nome al sia „ombro". Tio kaŭzas la ekeston de didaktika transformo kiu ekestas konsiderante la adresaton kaj en „ties" lingvo. Tio signifas ke en lingvo kiun li komprenas sur la nivelo de kompreno kun kiu li harmonias. Tio estas la formo kiu ankaŭ estas laŭenhave komprenebla ĉar ĝi enhavas malaltan informacion. La priskribita procedo povas esti klarigata ankaŭ pere de la redundanco. La procedo en kiu unu nocio estas korespondigata al alia nome al sia KRUDA SIGNIFO povas esti rigardata kiel tipo de didaktika transformo kie pere de la redundanco oni altigas la motivadon de la lernanto. Tiel oni pligrandigas ankaŭ la eblecon de komunikado inter la instruanto kaj la lernanto. La strukturo de la „ombroj" sur la nivelo de la KRUDA SIGNIFO ne devas esti identa kun la strukturo de la nocioj nur la nivelo de la SIGNIFO. Ne nepras ke la lernanto sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO atentu ke li agas laŭ la leĝoj de la logiko ĝenerale konataj. La ligoj inter la ombroj ne ĉiam sekvas logikajn leĝojn kaj ne ĉiam eblas trovi klarajn korespondaĵojn al la nocioj sur la nivelo de la SIGNIFO. Tial multaj „ombroj" povas esti neprecizaj.


Scienca laboro ekzemple prilaboras la nociojn normale sur la nivelo de la SIGNIFO. Kontraŭe popularscienca laboro pritraktas la nociojn kaj la nocian strukturon nur sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO. Ruza instruisto laŭsperte klopodas moviĝi ĉiam de unu nivelo al la alia kaj prezenti la KRUDAJN SIGNIFOJN de la nocioj en la lingvo kiu estas konata al la lernanto.

En la sekvanta prezento de serieca kaj holistika lernstrategioj pere de la instruaĵo „ekesto de feno" la nocioj necesaj por klarigi la instruaĵon estas prezentataj pere de „domo", kie la „muraro" de la „domo" reprezentas la SIGNIFON kaj la „tegmento" reprezentas la KRUDAN SIGNIFON de ĉiu nocio (t.e. la senperan sperton de la lernanto) - v.d bildo 2.

Prezento de serieca instrustrategio pere de la instruaĵo „ekesto de feno"

Komencante ĉe la jam klarigita karakterizaĵo de serieca agmaniero oni proponas jenan seriecan instrustrategion: Al la lernanto oni klarigos la instrucelon de la leciono sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO. (La informo sendata al la lernanto estu laŭeble neredunda.) Laŭ tio oni donas al li la informon pri la komenca nocio ankaŭ sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO. Ankaŭ tiu informo estu neredunda. Oni supozas ke la lernanto agnosku tiun informon (t.e. ke li principe kreas internan hipotezon pri tiu nocio). Poste li testas sian „ekscion" per la informo pri tiu nocio sur la nivelo de SIGNIFO. Sekve oni prezentas al li nocion kiu logike rilatas al nocio jam prezentita. La priskribita prezentomaniero estos ripetata (la nocioj konataj al la lernanto povas manki) ĝis kiam neniuj nekonataj nocioj el la struktura diagramo plu ekzistas.

La ĵus priskribita procedo estu klarigita pere de la nocio de „aerpremo":




Bildo 2


La celo de lernprocedo ne nur konsistas el akiro de izolitaj nocioj, sed el la kompreno de la tuta nocia strukturo de la instruaĵo fare de la lernanto. Kiam la serialisto konatiĝas kun ĉiuj nocioj el la struktura diagramo per la ĝisnuna maniero, li kreas hipotezojn (normale nur partajn strukturojn) pri la nocia strukturo de la instruaĵo, kiujn li testas pere de la kunteksta informo sur la nivelo de SIGNIFO. La tuta lernstrategio por serialistoj priskribita supre markiĝas per tri punktoj:

1) La transformo de la nocia strukturo de la instruaĵo al lineara nocia strukturo.
2) Alordigo de la kibernetika retrokupla cirklo al ĉiu nodo de la nova lineara strukturo.
3) Kreo de la nocia strukturo de la instruaĵo fare de la serialisto. (La nocia strukturo fariĝas nova objekto de ekkono.)

La metodo preiskribita ĉi tie povas skeme prezentiĝi jene:



Bildo 3: Prezento de serieca lernstrategio




Bildo 4: Okaza diagramo pri serieca lernstrategio

Prezento de redunda holistika lernstrategio pere de la instruaĵo „ekesto de feno"


Laŭ la karakterizado de la redunda holisto priskribita supre mi nun priskribos redundan holistikan lernstrategion.

Unue la instruaĵo de la leciono prezentiĝas al la lernanto sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO. (La informo iranta al la lernanto estas normale tre redunda). La redunda holisto rimarkas multajn nociojn el la nocia strukturo sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO kaj kreas kompleksajn hipotezojn pri la nocioj (kiel ekz. pri la kompenso de premo kaj la ekesto de nuboj). La kreitajn hipotezojn li testas poste per nekoneksaj informoj pri la nocioj sur la nivelo de la SIGNIFO. Poste oni povas prezenti al li la informon pri la instruaĵo sur la nivelo de la SIGNIFO.

La priskribita metodo prezentiĝos unue per bildo (vd. bildo 5) kaj poste per la okaza diagramo (bd. bildo 6):



Bildo 5: Prezento de redunda holistika lernstrategio




Bildo 6: Okaza diagramo pri redunda holistika lernstrategio


Prezento de neredunda holistika lernstrategio pere de la instruaĵo „ekesto de feno"

Al neredunda holisto prezentiĝos unue la informo pri la instruaĵo sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO kaj poste sur la nivelo de SIGNIFO. Post tio oni ofertos la informon pri la nocia strukturo al la lernanto sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO (kun multe da redundo). Por tiel helpi la neredundan holiston ĉe la klasifikado de la strukturejo kaj sekve ĉe kreado de kompleksaj hipotezoj pri la nocia strukturo de la instruaĵo. La lernanto testas tiun hipotezon pere de linearigita nocia strukturo unue sur la nivelo de KRUDA SIGNIFO (la nocioj enhavu normale malpli da redundo) kaj poste sur la nivelo de SIGNIFO.

Tiun strategion oni povas jene bildigi (vd. bildo 7 kaj bildo 8):



Bildo 7: **Prezento de neredunda holistika nocia strukturo**



Bildo 8: **Okaza diagramo pri neredunda holistika lernstrategio**

Literaturo

BRUNER, J.S.: Der Prozeß der Erziehung. Düsseldorf 1970
CRONBACH, L.J., R.E. SNOW: Aptitudes and instructional methods: a handbook for research in interactions. New York 1977
HEIDT, U.E.: Medien und Lernprozesse. Weinheim 1977
KOLB, D.A., M.B. GOLDMANN: Toward a typology of learning style and learning environments. Mass. Inst. Techn., Cambridge 1973
MILLER, G.A., E. GALANTER, K.H. PRIMBRAM: Strategien des Handelns. Stuttgart 1973
PARREREN van, C.F.: Algorithmische und heuristische Methode im Unterricht. In: K.-J. Klauer, H.-J. Kornadt (Hrsg.): Jahrbuch für Empirische Erziehungswissenschaft. Düsseldorf 1977
PASK, G., B.C.E. SCOTT: Learning Strategies and Individual Competence. In: Int. J. Man-Machine Studies (1972) 4, S. 217-253
PASK, G.: Styles and Strategies of Learning. In: Br. J. educ. Psychol., 46, S. 128-148, 1976
VESTER, F.: Denken, Lernen, Vergessen. Stuttgart 1975
WALLEN, N.E., R.M.W. TRAVERS: Analyse und Untersuchung von Lehrmethoden. In: Ingenkamp, K. (Hrsg.), Handbuch der Unterrichtsforschung, Teil II, Weinheim 1970 (Sp. 1217-1352)

Ricevite la 6an de oktobro 1989

Adreso de la aŭtoro: Dr. Vlastimil Polak, Stralsundweg 7, D-4770 Soest

Einige Thesen zur Entwicklung lernerorientierter Lehr- u. Lernstrategien für kognitive Lehrinhalte (Knapptext)

Die Berücksichtigung des kognitiven Stils des Lernenden beeinflußt in einem entscheidenen Maße seinen Lern- bzw. Mißerfolg.
Die Neuen Medien eröffnen neue Möglichkeiten für die Entwicklung und für den Einsatz von lernorientierten Lehr-/Lernstrategien. Eine derartige Lehr-/Lernstrategie wird hier am konkreten Beispiel demonstriert und in einer operationalisierungsfähigen Form vorgelegt.

Some Hypotheses on the Development of learner oriented teaching and Learning Strategies for Cognitive Teaching Matter (Summary)

Taking into consideration the cognitive style of the learner can have a decisive influence on his success or failure.
The New Media offer new possibilities for the development and application of learner oriented learning and teaching strategies. Such a strategy for teaching or learning is described with the heilp of a concrete example and elobarated in an operationable form.

grkg / Humankybernetik
Band 31 · Heft 2 (1990)
verlag modernes lernen

Zur Differenz der Begriffe „Strukturdeterminiertheit" und „operationale Geschlossenheit"

Eine Bemerkung zur Diskussion H. Franks vs. A. Nünning

von Axel ZIEMKE, Halle (DDR)

aus der Sektion Philosophie der Martin-Luther-Universität Halle (Lehrstuhl Prof.Dr. G. Schenk)

1. Einleitung

Eine Wissenschaft wie die Humankybernetik wird sich in ihrer Diskussion früher oder später dem seit der Antike problematisierten Gegensatz von Wirk- und Zweckursache stellen müssen, wie er konstitutiv für den Dualismus von Natur- und Geisteswissenschaften ist und spätestens in I. Kants drittem Widerstreit der Antinomie der reinen Vernunft zwischen Kausalität durch Freiheit und Kausalität nach den Gesetzen der Natur auf den Begriff gebracht wurde. Schon G.W. F. Hegels Überwindung dieses Gegensatzes machte eine Neukonzeption des Begriffes von „Wirklichkeit" erforderlich: So kritisiert er am „bisherigen Begriff der Logik, . . . daß das Objekt ein für sich Vollendetes, Fertiges sei, das des Denkens zu seiner Wirklichkeit vollkommen entbehren könne" (Hegel, 1965, I, 37) und setzt dem die spekulative Konstruktion einer durch Tätigkeit bzw. Subjektivität etablierten Wirklichkeit entgegen.

Doch erst in letzter Zeit thematisieren auch die Wissenschaften eine solche Revision des Wirklichkeitsbegriffes, insbesondere resultierend aus kybernetisch konzipierten Forschungen zur Neurobiologie. Innerhalb des Radikalen Konstruktivismus sind es insbesondere H.v.Försters „Theorie selbstorganisierender Systeme" und H. Maturanas „Theorie autopoietischer Systeme", die diesen Paradigmenwechsel im Begriff der „operationalen Geschlossenheit" konzeptualisiert haben. Während A. Nünning (1989) die Probleme der Bedeutung und des Verstehens in den Mittelpunkt seines Beitrages rückt, gewinnen die Probleme der „Strukturdeterminiertheit" und „operationalen Geschlossenheit" in der kritischen Projektion seiner Argumentation auf den (traditionellen) kybernetischen Informations- und Systembegriff durch H. Frank (1990) den entscheidenen Stellenwert, ohne daß deren wesentliche Differenzierung jedoch reflektiert wird.

2. Eine formale Differenz

Tatsächlich ist der Begriff der „Strukturdeterminiertheit" mit H. Franks (1990, 17) Formalisierung hinreichend erfaßt:

$$(y, z') = (\lambda_E(z, x), \delta_E(z, x)) =: h_E(z, x) \quad (1)$$

Und ganz in diesem Sinne betrachtet weder H. Maturana die „Strukturdeterminiertheit" noch H.v.Förster die diesem Begriff entsprechende „Nichttrivialität" als Spezifikum lebender Systeme.

Wiederum H. Franks (1990, 18) Intentionen entsprechend sehen beide Autoren Lebewesen wesentlich als „kreisrelational" organisierte „spontan-dynamische" Systeme. Dieser Zugang verlangt nun aber, sowohl den „Input" als auch den „Zustand" (also philosophisch: die Wirklichkeit) des lebenden Systems in ihrer Veränderung durch die Aktivität des Systems selbst zu fassen, so daß sich in Analogie zu H.v.Förster (1985, 207ff) zunächst folgende Veränderung von (1) ergibt (wir ignorieren hier die differenzierte Betrachtung von Ergebnis- und Überführungsfunktion):

$$(y', z'') = h_E\,(h_E\,(z, x)) \qquad (2)$$

Aus der Komplexität der Interaktionen zwischen System und Umwelt in ihrer topologischen wie historischen Dimension folgt nun eine praktisch unendliche Rekursion der Operationen des Systems aufeinander, so daß resultiert:

$$(y^\infty, z^\infty) = \lim_{n \to \infty} h_E^{(n)}\,(z, x) \qquad (3)$$

Diese Funktion stellt nun im Falle lebender Systeme ein Eigenwertproblem dar, dessen Lösung vom ursprünglichen „Input" des Systems ebenso unabhängig ist, wie etwa der Wert einer unendlich oft gezogenen Quadratwurzel von deren Argument.

Dieser Sachverhalt läßt sich wiederum analog zu H.v.Förster (1985, 211) so veranschaulichen:

$$\lim_{n \to \infty} h_E^{(n)}\,(z, x) = h_E \qquad (4)$$

Auf diese Weise ist der jeweilige „Input" wie der „Zustand" des Systems als „Observablen", also dem Beobachter zugängliche Größen, operational aufgelöst. Die Wirklichkeit des Systems besteht so ausschließlich in dessen Operationen, *ist* also dessen Tätigkeit (Ziemke & Stöber, 1990a,b).

Es versteht sich, daß auf *dieser* Beschreibungsebene weder sinnvoll von „Input" und „Output" noch von „Informationsübertragung" gesprochen werden kann: Das System ist *operational geschlossen*, interagiert nur mit den eigenen Operationen.

3. *„Umweltblase" und Verhalten*

Die von H. Frank (1990, 19ff) beschriebene „Deformation der Umweltblase" des Systems erfolgt nun streng innerhalb dieser „operationalen Geschlossenheit" durch die Konstruktion struktureller Kopplungen mit im Medium ablaufenden Prozessen bzw. konsensueller Bereiche mit anderen Systemen. Vermittelt werden diese Beziehungen im Falle mehrzelliger lebender Organismen über das Nervensystem, dessen „operationale Geschlossenheit" H. Maturana (1982, 227f) so kennzeichnet: „Die Organisation des Nervensystems als eines finiten neuronalen Netzwerkes ist . . . durch im Bereich der neuronalen Interaktionen geschlossene Relationen definiert. Sensorische oder

Effektorneuronen, wie sie von einem Beobachter beschrieben werden, der einen Organismus in seiner Umwelt betrachtet, sind davon nicht ausgenommen, da alle sensorische Aktivität eines Organismus zur Aktivität seiner Effektoroberflächen führt und alle Effektoraktivität seine sensorischen Oberflächen verändert."

Gut verständlich wird diese Rekursion im „klassischen" ethologischen Verhaltenschema: Durch die (schon in sich rekursiven) Operationen des ungerichteten Appetenzverhaltens ***konstruiert*** das Tier eine zum Objekt der Endhandlung hinführende Reizsitutation (der Beobachter würde sagen: es sucht diese). Ist diese Konstruktion „gelungen", konstruiert es über die (in sich wieder rekursiven) Operationen des gerichteten Appetenzverhaltens die die triebbefriedigende Endhandlung auslösende Reizsituation. Die Operationen der Endhandlung beziehen sich so rekursiv auf die Operationen des gerichteten und diese auf die des ungerichteten Appetenzverhaltens. Das Objekt der Endhandlung stellt dabei also den „Eigenwert" der rekursiven Operationen dar, der durch den Einschluß des Mediums zwischen Motorium und Sensorium konstruiert wird.

Das „andere Subjekt" (also etwa der Sexualpartner) ***wirkt*** hier also nicht durch das „Senden" einer Nachricht auf das System ***ein***, welches diese nur „empfängt" oder ***aufnimmt***, sondern das System ***setzt*** in seinem Verhalten diese Signale ***voraus*** und ***produziert*** die entsprechende Reizsituation.

Doch auch die *Wahrnehmung* dieser Reizsituation ist wiederum an die (motorische) Aktivität des Systems gebunden: aktualgenetisch über die sensorisch-motorische Reziprozität der „aktiven" Wahrnehmung (vgl. die „Holonomic Brain Theory" von Pribram & Carlton (1986) oder den „Wahrnehmungszyklus" nach Neisser (1979)), ontogenetisch durch die über motorische Aktivität vollzogene Entwicklung von Wahrnehmungsschemata (vgl. Piaget , 1971) oder phylogenetisch über die Bindung der Entwicklung angeborener Auslösemechanismen an die evolutionäre Verhaltensdifferenzierung.

Auch das Objekt der Wahrnehmung stellt also einen „Eigenwert" der rekursiven Wahrnehmungsoperationen dar.

Die Konsequenzen der „operationalen Geschlossenheit" für die Problematik der Sprache sind von A. Nünning (1989) hinreichend dargestellt.

„Operationale Geschlossenheit" bedeutet also nicht, daß die durch ein anderes Subjekt deformierte Umweltblase von innen blau, aber von außen vielleicht gelb oder rot aussehen würde (Frank, 1990, 20), sondern daß diese Deformationen vom System selbst konstruiert (also nicht *nur* „ausgedacht") sind. Die Deformationen der Blasenwand, wie die Blasenwand selbst existieren also nur als Koordinationen der Operationen des Systems.

